# La Rhume-fonto ĉe Pöhlde / Herzberg

La Rhume-fonto (germane: Rhumequelle) ĉe Pöhlde kaj proksime de Rhumspringe estas unu el la plej grandaj karstaj fontoj en Centra Eŭropo.
Dumtage ĉiusekunde elfluas ĉirkaŭ 2500 litrojn en la riveron Rhume. En inundaj sezonoj verŝiĝas el la fonto ĝis 5000 litrojn po sekundo.

La akvo havas konstantan temperaturon inter 8 kaj 9 gradoj de Celsius. Pro ĝia funelforma fontokavo je ĉirkaŭ 20 metroj laŭ diametro la Rhume-fonto estas unu el la plej gravaj naturmonumentoj en norda Germanio. Kune kun ĝiaj ĉirkaŭ 360 kromfontoj ĝi estas vivloko por maloftaj bestospecioj.
La Rhume-fonto ricevas akvon pleje de engrundiĝaĵoj de la Harc-riveroj Oder kaj Sieber (Siber). Tiuj engrundiĝejoj situas proksimume 50-60 metrojn pli altaj ol la fontokavo de la Rhume-fonto. Sinsekvoj de ter-enfalejoj montras la subterajn vojojn de la karsta akvo.

Koloriga eksperimentoj de la landa oficejo pri grundesplorado en la jaro 1991 pruvis la elgrundiĝon de Sieber-akvo en la Rhume-fonto, kiu situas 8,7 km sudokcidente kaj 40 m pli sube. La fluotempo estis preskaŭ kvar tagoj.



**La legendo pri la Rhume-fonto**

Romar, brila junulo, iam en arbaro ekvidis belan knabinan figuron, niksino nomata Ruma. Baldaŭ ili profunde enamiĝis. Kvankam la patroj de ambaŭ estis malamikoj, Romar kaj Ruma geedziĝis. Post kelke da tempo, kiam Ruma jam naskis ĉarman knabon, la patro de la niksino eksciis la aferon. Li turmentis sian filinon kaj postulis, ke ŝi forlasu Romaron. Tamen ŝi restis fidele amanta lin.



Tial la kolera maljunulo malbenis sian filinon, mortigis ŝian infanon kaj malliberigis Ruman al kaverno. Ree kaj ree la brava niksino provis atingi sian edzon per vojoj subteraj, kiuj ekzistas ankoraŭ hodiaŭ. Finfine, post multaj jaroj ŝi sukcesis fuĝi el la influsfero de la kolera patro. Kiel akvofluaĵo ŝi atingis la taglumon. La loko, kie okazis tio, nomiĝas nun memore al ŝi "la Ruma" (Rhume-fonto).